Regularo konkurso Ĝanfranko 2026

Itala Esperanto-Federacio, por omaĝi Gianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de “Muzika Kulturo”, organizas konkurson pri kanzonoj originale verkitaj en Esperanto. La komisiono povos asigni maksimume tri premiojn.

La rezultoj estos anoncitaj enkadre de la 92-a itala kongreso de Esperanto, dum specifa programero.

Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume unu verko, kiu devas esti neniam antaŭe eldonita per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekva jaro. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Valerio Dalla, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝanfranko, ricevos monpremion de 200,00 eŭroj; por la aliaj la premio konsistos el esperantlingvaj KD-oj. Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Laura Brazzabeni, sekretario Valerio Dalla, juĝantoj: Pierluigi Cinquantini, Martin Wiese, Flavio Fonseca. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por pliaj informoj : concorso@esperanto.it FEI, concorso, via Villoresi 38, 20143 Milano, Italia